

# Usona Esperantisto № 2018:5 (sep-okt)

## Anoncoj

Letero de la Prezidanto de UEA; Korespondi deziras;  
Esperanto-Karavano 2019; Nove reeldonita albumo de  
Amplifiki

## Media hits

The Christian Science Monitor; Princeton University  
Library

## Kia ĝojo!

**de la prezidanto** • Filipino DORCAS

En la klubo ni estis (kaj estas) amikoj malgraŭ ĉiuj  
malsamecoj. Tiuj malsamecoj estas ja gravaj, sed ili ne  
ĝenas nian amikecon. Ni lernas de unu la alia. Ni ĝuas  
la etoson, kiun Esperanto donas al ni.

## De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

## Ron GLOSSOP

**laŭdoj** • Charlotte BURTON

Ĉi-monate ni laŭdas laboreman samideanon, kiu  
helpadas la movadon en Usono dum multaj jaroj.

## Best of Ask Me Anything (AMA)

**demandu al Usona Esperantisto** • Filipino DORCAS,  
Charlotte BURTON, Hoss FIROOZANIA

Selected questions and answers from recent *Ask Me  
Anything* events online.

## Kiel ampleksa estu nia retarĥivo?

**de la redaktoro** • Hoss FIROOZANIA

EANA estis organizo kiu plenumis kernan rolon en la historio de Esperanto en Usono. Sed niaj rilatoj kun EANA estis tre  
streĉa, kaj eĉ malamika. Ĉu do taŭgas aldoni ĝiajn bultenojn al nia retarĥivo?

## ELNA kaj EANA: Fondo kaj malfondo

**el la arĥivo** • David B. RICHARDSON

Resumo de la revolucia fondiĝo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), pro tragedia skismo en la iama  
Esperanto-Asocio por Norda Ameriko (EANA).

## La timanta riĉulo

**enigmo-solvoj**

La solvo de nia pasintnumera enigmo.

## La ŝlosita ĉambro

**enigmoj** • Daĉjo RUTAN

“Mi kredas, ke li fraŭdis min je dekmil dolaroj, sed mi ne scias, kiel li faris la aferon.” — “Eble se vi klarigu”, diris Ŝibolet.

## Senintencaj esperantaĵoj?

Benu, ami, vero, forto!



# Anoncoj

## Letero al aligitaj membroj de UEA en Usono

UEA havas novan kotiz-sistemon, fiksiton de la Komitato dum siaj kunsidoj en Lisbono lastan Aŭguston. Per ĝi ni enkondukas tre malmultekostajn kotizojn por la plej malriĉaj landoj de la mondo, sed kompanse iom plialtigas la kotizojn en la riĉaj landoj, inkluzive de Kanado kaj Usono.



Mi havas tamen du bonajn novaĵojn por usonanoj. La unua estas tio, ke baza membreco en UEA kostas apenaŭ pli ol unu usonan dolaron semajne. Se malfacilas al vi pagi tiom en unu fojo, vi povas aranĝi regulajn partajn pagojn el via PayPal-konto aŭ per via kreditkarto (ekzemple \$14 ĉiun trian monaton). Temas pri vere malgranda sumo por esprimi vian apartenon al la tutmonda komunumo de esperantistoj kaj subteni ĝian plifortigon kaj kreskigon.

La dua bona novaĵo estas speciala oferto por esperantistoj en Usono. Ĝin inspiris la fakto, ke la 105-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montrealo post malpli ol du jaroj. Se vi nun aliĝos al UEA por **tri jaroj** (2018-2020 aŭ 2019-2021), vi ricevos signifan rabaton je la tuta sumo: \$115 por trijara baza membreco, \$215 kiel Membro-Abonanto. Kompreneble, kiel membro vi ankaŭ rajtos je rabatita kongreskotizo por Montrealo, same kiel por Lahtio, Finnlando, en 2019, kune kun la aliaj servoj kaj rajtoj de niaj individuaj membroj.

Mi volas ankaŭ atentigi, ke unuafoje UEA donas rabatojn al junuloj. Ĝis la aĝo de 19 jaroj, la baza membrototizo estas nur \$14, kaj inter la aĝoj 20 kaj 25 nur \$27. Ni ne donas kroman specialan rabaton por tiuj kategorioj (kiuj ja ricevas la kongresan rabaton kaj la aliajn rajtojn kaj servojn), sed jes eblas aliĝi por trijara periodo pagante la sumon de la koncernaj kotizoj.

Por profiti la rabaton, vi devas aliĝi pere de la reta

aliĝilo por la jaro 2019 <<https://uea.org/alighoj/alighilo2019>>. Plenigu ĝin por la jaro 2019, kaj skribu sube de la aliĝilo, ĉe *Notoj, komentoj*: **Trijara oferto Montrealo2020**. Bonvolu noti, ke se vi ne jam estas membro en 2018, ni membrigos vin en tiu jaro kaj la du postaj. Tiel vi ankaŭ ricevos la Jarlibron 2018, kaj se vi aliĝas kiel Membro-Abonanto, la presitan revuon *Esperanto* por la nuna jaro. Se vi jam membriĝis en 2018, via trijara membreco daŭros ĝis 2021.

Paroli Esperanton estas radikala ago favore al justeco, egaleco, demokratio. Nia nova membrosistemo estas bazita sur la samaj valoroj; ĝi meritas vian subtenon kaj partoprenon. Kaptu la okazon aliĝi al UEA por tri jaroj! Kaj, se viaj financoj tion permesas, konsideru fariĝi membro de Societo Zamenhof (por aldonaj \$178), aŭ donacu al niaj fondaĵoj por subteni la agadon por Esperanto en diversaj mondopartoj kaj sur plej diversaj kampoj.

P.S. Vi povus eviti ĉiujn komplikaĵojn pri jarkotizoj, fariĝante Dumviva Membro de UEA. Ĝis la fino de 2018, validas la malnovaj tarifoj: 25-oblo de la koncerna jarkotizo, t.e. \$775 por dumviva baza membreco kaj \$1,950 por Membro-Abonanto. Neniam poste vi havos tiel bonajn kondiĉojn! Ekde la nova jaro la prezo altiĝos ĝis 30-oblo de la koncerna jarkotizo.

— Mark FETTES, Prezidanto de UEA

## Korespondi deziras

Mi deziras korespondi pri unuigo de la homaro, universala edukado, ĉesigo de milito, kaj scienca senmorteco en ĉi tiu vivo.

**Phil EDWARDS, TH USP  
21874045, Box 33, Terre  
Haute IN 47808**



Mi deziras korespondi pri punto, kroĉetado, kaj lanbrodado.

**Joel HILTON, TH USP 12394028, Box 33, Terre  
Haute IN 47808**

Mi deziras korespondi pri sekulara humanismo, kosmo, marso, kaj komputiloj.

**Stanley AMES, TH USP 73047065, PO Box 33,  
Terre Haute IN 47808**

## Esperanto-Karavano 2019

La organizantoj de la Esperanto-Karavano 2019

<<http://esperanto-karavano.info/itinerario2019.html>>

invitas vin partopreni tiun postkongresan trajnvojaĝon tra Rusujo, Mongolujo, kaj Ĉinujo. Estas bonvenaj ankaŭ viaj Esperanto-samlandanoj kaj diverslandaj geamikoj.



Por informo pri antaŭaj karavanoj, vidu la buntajn raportojn de Arnold VICTOR, *Tra Siberujo al Mongolujo* (en *UE* N<sup>o</sup> 2010:6) kaj de Frans VAN DER HORST, *Pano kaj salo, lakto kaj mielo* (en *UE* N<sup>o</sup> 2018:1).

## UEA launches free membership category

UEA (Universala Esperanto-Asocio) has just launched a new program called *Amikoj de Esperanto* (“Friends of Esperanto”) for people who are learning — or interested in learning — Esperanto. It doesn’t cost anything. Those who register show their support for Esperanto and receive brief information about Esperanto and UEA



in their native languages.

If you’re under 35 years of age, you’ll also receive free membership in the youth organization TEJO.

For more info, see the English-language signup form <<http://esperanto.net/en/friends-of-esperanto/>>. There’s a symbol at the top right of the form to choose other languages.

## Tute ne gravas nun en bita formo

Tridek du jarojn post la eldono de albumkasedo en 1986, la eldonejo Vinilkosmo lanĉas bitan reeldonon tute remastrigitan de la unua Esperanta rokalbumo de la bando Amplifiki.



Amplifiki estis siatempe stela bando dum internaciaj renkontiĝoj de la Esperanta junularo. Tra tuta Eŭropo la efiko de ĝia pure rokenrola muziko kun nuancoj de bluso starigis la bandon kiel ikonon de la Esperanta rok-movado.

En la nove reeldonita bita albumo oni trovas mejloŝtonajn titolojn kiel *Sed tute ne gravas*, *Domo en Bonn*, *Brava bardo*, *Ruĝo kaj blu’*, kaj *IS*. Troviĝas ankaŭ la neforgesebla *Sola* komponita kaj kantita de Kimo, titolo kiun konas kaj kunkantas esperantistoj tra la tuta mondo.

Por pli da informo, vidu la retpaĝon pri *Tute ne gravas* ĉe Vinilkosmo <<https://bit.ly/2C64SOC>>.

## Media hits

### ***The Christian Science Monitor***

On October 11th *The Christian Science Monitor* published a brief article titled *The (impossible?) dream of a universal language*

[https://bit.ly](https://bit.ly/2Jzco0b)

[/2Jzco0b](https://bit.ly/2Jzco0b), in which author

Melissa Mohr touches on a few highlights in the long history of human attempts to create a viable interlanguage. Naturally, she mentions Esperanto:

Perhaps the most famous universal language was created in 1887 by Ludwik Zamenhof: Esperanto. Zamenhof had a “dream of the unity of humankind,” believing that a single language could bring lasting peace to the world.

To facilitate its spread, he designed Esperanto to be easy to learn – he thought the basics could be mastered in a week – with a predictable grammar and a lexicon derived from common European languages. Of all the universal languages, this one has been the most successful, boasting around 100,000 speakers and a place in Google Translate.

### ***Princeton University Library***

On October 11th, Princeton University published an article announcing a unique addition

<https://bit.ly/2F06kW8> to their library: an original edition of Zamenhof’s *Unua Libro*, gifted by Humphrey Tonkin. The event was attended by an



audience of distinguished faculty, including Prof. Esther Schor, author of the recent *Bridge of Words*. As the article explains,

Humphrey’s gift is a copy of the first Polish edition, which was issued shortly later in 1887. The book became commonly known as “Unua Libro” only after Zamenhof authored a follow-up in 1888, titled “Dua Libro (Second Book).” Zamenhof reprinted much of “Unua Libro” in “Fundamento de Esperanto (Foundation of Esperanto)” which he published in 1905 as the authoritative grammar of the language.

Also mentioned:

Due in large part to the activity of its current faculty, Princeton University aspires to be an international center for the study of Esperanto and constructed languages: Prof. Starry [Esther] Schor (English) is an international authority on Esperanto and the author of its most recent major study, “Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language” (2016); Profs. Joshua Katz (Classics) and Michael Gordin (History) pursue research in related areas and have co-taught a popular undergraduate course on constructed languages. In support of this teaching and research, the Library has recently increased its acquisition of both current and retrospective titles, some of significant rarity.



# Kia ĝojo!

de la prezidanto • Filipino DORCAS

**M**algraŭ la distanco, mia edzino Beth kaj mi partoprenas en la kunvenoj de la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso kiel eble plej ofte. La membroj de la klubo estas diversnivelaĵaj parolantoj. Kelkaj havas multe pli da jaroj en Esperantujo ol mi, sed ni havas ankaŭ novajn membrojn.

En niaj klubkunvenoj ni ĝuas diversajn agadojn. Ni legas literaturon laŭtvoĉe. Ni nun legas la romaneton *La Verda Koro* de Julio BAGHY. Ni babilas pri niaj vivoj, niaj ĝojoj, kaj niaj problemoj. Ni lernas plu pri unu la alia. Ni interparolas pri gramatiko. Ni ludas tre amuzajn ludojn, kantas, konversacias pri interesaj artikoloj, faras planojn, kaj lernas pri la movadoj landskala kaj eksterlanda. Por mi la plej grava parto de la kunvenoj estas la amikeco.

Ni estas tre pardonemaj kiam oni fuŝas la uzadon de *iĝ* kaj *ig*. Kelkfoje ni forgesas la akuzativoN, sed ni helpas unu la alian dum ni lernas la lingvon progreseme. Ni estas amikoj.

Fakte, mi aktivas nun en Esperantujo pro sperto en ĉi tiu klubo antaŭ dudek jaroj. Mi trovis la klubon per la listo de lokaj grupoj en nia retejo. En tiu listo mi trovis informon pri klubo en mia regiono, kaj retmesaĝis al Fred MEYER, kiu varmege kaj amikeme invitis min al la klubkunveno en Januaro, 1998. Post mia unua klubkunveno, daŭris retmesaĝoj pri la feliĉeco, la lingvo, kaj la amikeco. Membroj de la klubo reinvitis min al la sekva kunveno. Ili akceptis min malgraŭ personaj problemoj kaj lingvaj fuŝoj. Poste mi lernis pri la “interna ideo” de Esperanto kaj pri la “verda koro”. Tiuj klubanoj estis veraj

bonkoruloj.

Tie en la klubo mi trovis grandan diversecon inter la amikoj. Ne multe gravis ke mi estis komencanto. Ne gravis politikaj pensoj, la religiaj kredoj, la koloro de la haŭto, la kulturo, la vivstilo, aŭ iu ajn trajto, kiu povus dividi la homojn. Tie en la klubo ni estis (kaj estas) amikoj malgraŭ ĉiuj malsamecoj. Tiuj malsamecoj estas ja gravaj, sed ili ne ĝenas nian amikecon. Ni ĝuas koni unu la alian. Ni lernas de unu la alia. Ni ĝuas la etoson, kiun Esperanto donas al ni, danke al la malavara donaco de Zamenhof. Kia ĝojo!

Kiel fartas via klubo? Ĉu ekzistas klubo en via urbo? Kiu estas la helpanto, la kunordiganto pri kluboj en via regiono? Kion via klubo planas? Kio mankas al via klubo? Komunikigu kun la kunordiganto en via regiono kaj kun la aliaj lokaj grupoj en via regiono. Partopreni en loka grupo estas ja granda ĝojo. Faru!

Kion vi planas por la naskiĝtago de Zamenhof? Tio okazas la 15-an de Decembro. Ofte la festo kiu omaĝas al Zamenhof estas la plej granda, plej populara evento de la jaro por lokaj grupoj. Ni invitas vin plani eventon kun viaj samklubanoj kaj ĝuu la feliĉan etoson de Esperantujo! Kia ĝojo!

**Ek kaj Antaŭen! Onward and Upward!**



**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)

## De la estraro

En ĉiu numero de *UE* mi petas raportojn de la estraranoj pri lastatempaj agadoj. Mi bonvenigas viajn demandojn por ili, ĉu en Esperanto aŭ angle. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono. — *Red.*

### Charlotte BURTON, Direktoro

Mi verŝajne okupiĝas pri Esperanto ĉie ajn en mia vivo nun, kaj meze de ĉio, mi translokiĝas al nova apartamento. Pri mia laboro kiel estrarano de Esperanto-USA, ni ĉiuj helpas pri la planado de kelkaj novaj projektoj, kaj krom tio, mi estos la ĉefa kontaktulo inter Esperanto-USA kaj la LKK de la venonta UK-2020 ĉe Montrealo. Mi parolos al la LKK nome de Esperanto-USA kaj parolos kun nia estraro pri kiel helpi ilin. Krom tio, mi baldaŭ intencas komenci novan serion ĉe mia YouTube-kanalo, nomatan *Aktivigu*. Ĝi estos tute en Esperanto kaj prezentos ideojn pri kiel oni povas aktivigi pli en Esperantujo – eblajn respondojn al la ofta demando “mi volus fari pli pri Esperanto, sed kion fari?” Oni povas atendi tion iam dum la venonta monato.



Cetere mi ricevis komentojn de la Akademio kaj de kelkaj aliaj pri la malneto de mia venonta lernolibro. La nuna plano estas, ke dum la venonta jaro, mi uzos tiajn komentojn kaj kelkajn aliajn rimedojn, kiujn mi ricevis aŭ per la malavareco de ESF aŭ de mia laborejo, pri la instruado de lingvoj, por redakti kaj plibonigi la malneton. Pli da novaĵo pri tio ĉi venos dum la venontaj monatoj kaj venontjare.

— *Charlotte BURTON*

### Jordon KALILICH, Direktoro

Ĉi tiun jaron mi vidas junajn esperantistojn en Usono plientuziasmiĝi. Sendube helpas al tio la furoro de Duolingo, Telegramo, Amikumu kaj Reddit ĉe junuloj kaj la sukceso de la landaj kongreso kaj postkongreso.

Ni en la estraro planas utiligi la novan vigecon per reaktivigo de nia junulara sekcio, Usona Esperantista

Junularo (USEJ). Se vi havas ne pli ol 35 jarojn kaj volas roli en la restarigo aŭ funkciado de USEJ, bonvolu kontakti nin. Pli detale pri niaj planoj vi legos ĉi tie dum la venontaj monatoj.

— *Jordon KALILICH*



### Paige FELDMANN, Direktoro

The Universala Kongreso will be held in Montreal, Canada in 2020. Esperanto-USA expects to be heavily involved in the UK 2020, and hopes to capture the attention of young Esperanto learners worldwide.



However, to make the maximum impact, we need your help. We are now accepting donations to the Universala Kongreso 2020 fund. Donations are essential to properly execute this event. For more information, please contact Phil Dorcas at [filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org).

— *Paige FELDMANN*

### Nikvo WOODS, Direktoro

Mi, Jordon KALILICH, kaj Filipo DORCAS formis novan komitaton por sendi leterojn al homoj kiuj estis membroj de E-USA sed ne decidis rememrigi la sekvan jaron; poste ni esperas ke tio kreskos al kampanjo por pli bone komunikiĝi kun membroj je pli persona nivelo. Ni ĉiam bonvenigas viajn sugestojn kaj komentojn, ĉu poŝte ĉu interrete per Facebook, Twitter, aŭ Reddit.



— *Nikvo WOODS*

# Ron GLOSSOP

laŭdoj • Charlotte BURTON



Malmultaj homoj en Usono estas tiom aktivaj pri Esperanto-edukado kiom Ron GLOSSOP. Prezidanto de la edukada grupo Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, estro de la Schulze-Fondaĵo, kaj estro de la Daŭra

Kongresa Komitato, Ron estas ne nur parto de la movado, sed fakte li mem estas grava movanto por Esperanto.

Dum multaj jaroj, Ron servis kiel prezidanto de la Amerika Asocio por Instruistoj de Esperanto (AAIE). Per tiu ofico, li multe helpis al instruistoj ĉie en Usono. Li plue helpas al instruistoj eĉ ekster Usono, per Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo. Nome de tiu fondaĵo, li ankoraŭ sendas instruistajn materialojn al instruistoj de Esperanto en aliaj landoj, inkluzive de kelkaj landoj en Afriko. Pro liaj laboroj, la movado tie plue kreskas.

Pro liaj laboroj kiel estro de la Schulze-Fondaĵo kaj de la Daŭra Kongresa Komitato, la movado ankaŭ ĉi tie plue kreskas. La Schulze-Fondaĵo temas pri edukado kaj celas helpi al edukistoj kaj pri edukaj aferoj en Esperantujo. La Daŭra Kongresa Komitato helpas pri nia jara Landa Kongreso. Ĝia tasko estas trovi lokon por la venontjara kongreso kaj helpi al la Loka Kongresa Komitato (LKK), por ke la LKK povu profiti de la sperto kaj scio de aliaj. Se vi volas partopreni la Daŭran Kongresan Komitaton, bonvolu sendi mesaĝon al la estraro de Esperanto-USA.

# Best of Ask Me Anything (AMA)

demandu al Usona Esperantisto • Filipino DORCAS, Charlotte BURTON, HOSS FIROOZANIA

---

For much of 2018, the President and board have been hosting online Q&A sessions in our subsection of Reddit <<https://reddit.com/r/EsperantoUSA>>, the free online discussion forum. As per Reddit tradition, these Q&A sessions are known as *AMA*, for *Ask Me Anything*.

Questions to an AMA are submitted over a day or so, and readers get to rate them. Then, at a pre-scheduled time, the board spends about an hour answering the highest-rated questions. I've collected some of the questions and answers here, both for our members who don't use Reddit, and for the sake of including the information in our newsletter archive.

Future AMA events will be announced on our home page, and as always we welcome questions sent directly to the newsletter. — *Ed*.

---

## **Does E-USA have any efforts to get Esperanto taught in public schools or community colleges? If so, how successful? What arguments have been successful getting Esperanto classes going? Or, is the bottleneck volunteers to teach such seminars/classes?**

The biggest barrier to Esperanto in public schools in the USA is the lack of certifying exams that are accepted by individual states. If a state approves an Esperanto certification exam, anyone can get certified, and from there, it becomes easier to convince your local school or district to take the risk on an innovative course like Esperanto. Without a certifying exam, federal law has their hands somewhat tied; districts can't hire a teacher who isn't "highly qualified" in their subject area, and without a teacher, there is no course.

If you want to open the door for more Esperanto classes in public schools, contact your state's education agency or board of education to ask about getting an Esperanto certification test added.

For Esperanto we have the KER exams administered by the administrator of [edukado.net](http://edukado.net). The KER (aka *Common European Framework of Reference*) is what some in the USA are considering as credentials. Our board member, Charlotte Burton, presented Esperanto to the education certification board in Texas as a step in getting Esperanto on the list of

accepted languages for Texas. It will take several courageous steps in several states for us to see real progress. It is much easier for families to make the decisions for home schools, community classes, and self study.

One of our main resources for teaching Esperanto in the USA is AATE (AAIE), The American Association of (*Instruistoj*) Teachers of Esperanto. It is a partner association with Esperanto-USA. It has separate membership, but you can join AAIE when you join Esperanto-USA at the same time. I will be glad to forward this question on to Ron Glossop, who is the current president of AAIE.

— *Phil Dorcas*



## **Would Esperanto-USA or any of its partner associations consider offering some kind of certification that is specific to the United States? I've read that the KER exam uses the CEFR scale, but that, in my experience isn't very widely understood in the US.**

Hello! I am the aforementioned board member who has been working on getting Esperanto certification in Texas, so I may be able to speak to this.

You are absolutely right about the KER exam, which makes it super helpful in some other countries but, as you note, not as much so in the USA. However, due to the way education works in the USA, each state essentially has its own rules. There are certain federal laws (like *No Child Left Behind* or the *Americans with Disabilities Act*) which all US states and territories must follow, but beyond that, laws and rules concerning education vary widely from state to state. A person who gets certified in Texas, for example, does not automatically get certified in any other state. You have to go through the individual requirements for each state in order to be certified in that state, making any sort of nation-wide certification test especially tricky. Aside from things mandated by federal law, there's not much in



common between states when it comes to public education. Texas is very different than Kansas is very different than California.

— Charlotte Burton



### **What's your advice on starting new local groups/chapters? How do you balance a group for beginners with a group for proficient speakers that want to practice more conversation?**

Step 1: Communicate with your regional helper if there is one for your area. We are currently searching for regional helpers in the USA for strengthening our communication infrastructure with local groups.

Step 2: Get visible. Get people together.

1. Establish a contact and have it on the Esperanto-USA website. Interested people will have a way to locate you.
2. Be sure that members are aware that there is a member list for Esperanto-USA that is sent out each year in paper form. Local groups should urge members to be a part of member body of Esperanto-USA.
3. Amikumu <<https://amikumu.com>> is another great tool to get connected. Use it to send messages to those nearby.
4. Make an announcement in the local newspaper or city website, if there are announcements for local events.

Step 3: Meet, either in person or virtually on the Internet with Google Hangouts, Zoom, or other meeting tool.

Step 4: Find out what people want to do and what their goals or visions are for a local Esperanto group. This is to find out what you have in common and to discover the needs.

Step 5: Communicate with the group and follow the vision.

Step 6: Be sure you listen to each member of the group to find out why they are interested in Esperanto. Each participant in the club is important, and none more important than the beginner, the

newcomer. Respect their importance and contributions.

Step 7: Stay in contact with your regional helper.

One size does not fit all. Of all the clubs I've heard about, each seems to be unique. It is up to each local group to decide on its purpose, structure, and meeting content.

Balancing content between skill levels, learning styles, ages, and purposes is a challenge. Each club meeting should have a variety of activities which are taken from suggestions of the members themselves. Each member should be willing to participate for a short while in common activities, even if it might be boring for advanced speakers or overwhelming for the beginner.

This is a crucial topic because local groups are crucial to the Esperanto movement. You will have a regional helper, who will be your primary contact for these answers. The board is treating local groups as a very high priority. We want to know what you need from us. Esperanto-USA is here to support, nourish, and encourage local groups. Stay tuned to our website and to our bulletin *Usona Esperantisto* for more support, stories, and help for local groups.

— Phil Dorcas



### **Kio estas la plej bona metodo instigi aŭ vigligi amikojn/familianojn lerni Esperanton?**

Vi uzis ŝlosilan vorton: *vigligi*. Ne provu “konvinki” iun. La plej bona maniero estas per niaj historioj. Niaj rakontoj malkaŝas, kial ni faras aferojn. Ili montras kiel ni faris iujn decidojn kaj pri kio niaj prioritatoj fariĝis. La celoj, kialoj, motivoj estas gravaj. Paroli pri kial oni devus lerni Esperanton por pli bona mondo estas timiga “vendpropono”, kiu donas malmultan frukton. Nia plej bona vendpropono ne estas pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de lingvoj. Nia plej bona metodo estas nia koro-varmigaj aŭ movad-ŝanĝaj historioj.

Unu ŝlosila elemento estas unue ekkoni la aŭskultantojn. Al kiu vi parolas? Stephen COVEY diris: “Por esti komprenata, oni unue devas kompreni.”

Aŭskultu vian familion kaj amikojn por ekscii tion, kio gravas al ili. Kion ili serĉas? Rilatu al ili kaj trovi komunajn valorojn en via historio.

Ni en la estraro de Esperanto-USA serĉas bonajn historiojn por uzi en nia literaturo, nia retejo, kaj en sociaj komunikiloj. Ni havas kelkajn, sed bezonas pli. Skribu al nia redaktoro aŭ al la estraro, se vi havas interesan historion aŭ citaĵon por helpi nin. Dankon.

— *Phil Dorcas*



### **Where can I listen to Esperanto being spoken?**

There are many, many examples of spoken Esperanto in podcasts and on sites like Youtube, but the quality varies enormously, and not all are great models for students. One site I especially like is the blog *Esperanta retradio*

<<http://esperanto.brazilo.org/archives/tag/paulo-sergio-viana>> — particularly the entries by Paulo Sérgio Viana of Brazil, an Esperantist well-known for his literary translations, articles in *Monato*, and prizewinning entries in the *Belartaj Konkursoj* of UEA.

His contributions to *Esperanta retradio* are outstanding: the content is well-written, the pronunciation is clear and steady, and the accent is very close to the international “ideal” to which many speakers aspire. Each spoken entry is accompanied by the corresponding text, so you can read along as you listen.

— *Hoss Firooznia*



### **Kion vi diras al homoj kiuj mokas Esperanton?**

It is easy to get this wrong. I usually get this wrong and chastise myself later for not taking advantage of a seemingly difficult situation.

Listen to the mocker. Listening works wonders. The mocker will expect you to get all bent out of shape and get defensive. Be open, inviting, and set yourself into a relationship mode to listen.

Do not try to convince anybody of anything.

Use stories. The mocker will often ignore the facts, no matter how factual they are. However, the mocker doesn't know your story.

To contradict, don't use any negative words. Think of something like: “Well, what I've experienced is ...” Show an attitude of curiosity and softness.

Ask questions to invite a dialog. “Where did you hear that? ... Yes, we get that a lot. There are certainly a lot of myths out there, and it is hard to separate the fact from fiction.”

Try to find a common ground, even if it is an extremely remote one. “So, we both seem to have an interest in languages.” Or for the completely negative: “So, we seem to both understand the importance of our respective cultures.”

“Esperanto celebrates the differences, and we certainly seem to have them! I am all about communicating with people who are different than I am.”

Each case is different, but don't get defensive. Be ready to learn, relate, listen, with patience.

Learn about our history. Learn about Zamenhof. Be equipped with some great tools in your discussions with your future friends. Sometimes the greatest critics become the greatest supporters. The opposition is not the enemy. Apathy is the enemy.

—*Phil Dorcas*



### **Kiel povas nova esperantisto kaj nova membro de Esperanto-USA partopreni en la organizo kaj la Esperanto-movado en Usono? Kaj kio estas farenda, se la loka klubo ŝajnas malaktiva, kaj oni ne povas kontakti ĝiajn estrojn?**

Certe la loka klubo estas la ĉefa maniero partopreni en la movado en Usono. Eĉ por regionaj, landaj, kaj internaciaj eventoj, ofte la loka klubo havas la informon, kiun vi bezonas. Tiu informo venas per nia retejo, nia bulteno *Usona Esperantisto*, kaj per la komunikado al la klubestroj kaj regionaj

kunordigantoj.

Krom aktiviĝi en loka grupo, vi konsideru ĉeesti landan kongreson, regionan kunvenon, kaj aliajn eventojn. Eble vi havas viajn proprajn ideojn pri tio nova, kion vi volas vidi en la mondo per Esperanto. Diskutu viajn ideojn kun viaj novaj amikoj en la movado.

Se vi ne havas proksiman aktivan klubon, vi nepre komunikigu kun via regiona kunordiganto. Se tio ne fruktodonos, bonvolu kontakti min aŭ alian membron de la estraro de Esperanto-USA. Tiukaze, ni eble kune starigos novan grupon en via urbo!

—Phil Dorcas

---

## Kiel ampleksa estu nia retarĥivo?

de la redaktoro • HOSS FIROOZNA

**E**stas plezuro anonci, ke finfine kompletiĝas nia reta kolekto de malnovaj bultenoj de Esperanto-USA (kaj de ELNA, la pli frua – kaj daŭre leĝa – nomo de nia organizo).

Tra la jaroj multe ŝanĝiĝis la nomo, enhavo, kaj aperritmo de nia bulteno. Foje ĝin akompanis dikaj suplementoj kun enhavo literatura aŭ kultura. Foje ĝi preskaŭ malaperis, aperante nur sporade. Iam ĝi ekzistis kiel *du* paralelaj publikaĵoj: unu tute en Esperanto, kaj unu en la angla. Kaj nun, ĉiuj estas kune konservitaj bitforme, facile alireblaj per Interreto. En nia arĥivo vi povas elŝuti PDF-skanaĵojn de ĉiuj numeroj ekde la plej unua, kiu aperis en Januaro, 1953!

Aldone al sia bulteno, ELNA iam eldonis ankaŭ gazetojn de parencaj organizoj. Ekzemple, en la 60-aj ĝis 80-aj jaroj ELNA eldonis la gazeton *JEN* (“Junularo Esperantista de Nordameriko”), kaj en la 90-aj jaroj, *KTP!* (de la Usona Esperantista Junularo). Kvankam tiuj bultenoj estis iusence sendependaj de ELNA, mi nun klopodas aldoni ilin al nia arĥivo, ĉar ili estis grava parto de la historio de Esperanto en Usono. Cetere mi supozas ke ilia apero en nia arĥivo ne ĝenos iun ajn.

Kaj tiel leviĝas rilata demando malpli facila. Kompreneble, la historio de la usona Esperantomovado ne komenciĝis kun ELNA: antaŭe floris la *Esperanto-Asocio de Norda Ameriko* (EANA), kiu dum duonjarcento estis la oficiala “Landa Asocio” de Usono. Ĝia bulteno *Amerika Esperantisto* estis grava parto de nia komuna movada historio. Do ĉu ne indas aldoni ankaŭ ĝin al nia arĥivo?

Eble jes ... sed pro historiaj kialoj la afero estas iom

pli pripensinda.

Kiel Bill HARMON detale rakontis en sia *History of ELNA* <<https://bit.ly/2DBtX5P>> (nun senpage elŝutebla), en la 50-aj jaroj okazis tre akra, katastrofa skismo en EANA. Pro diversaj kialoj la estraro decidis ekŝigi de UEA. Membroj ribelis, fondinte novan asocion, ELNA. UEA finfine agnoskis ELNA-n kiel la Landan Asocion de Usono, kaj EANA iom post iom malaperis. Ĉi-monate sub la rubriko *El la arĥivoj* mi reaperigas artikolon de David RICHARDSON kiu koncize resumas la malfeliĉan historion.

La skismo kaŭzis psikan traŭmaton por la usona movado, kaj la lezoj longe restis. Mi ne volas agaci tiujn malnovajn vundojn, sed mi esperas, ke post tiom da jaroj ni povas trakti la aferon pli-malpli senpasio, kiel esencan parton de nia komuna historio de Esperanto en Usono.

Kiel la nuna Landa Asocio por Usono, Esperanto-USA estas heredanto kaj protektanto de tiu historio. Do en la venontaj monatoj mi komencos enskani kaj aldoni ankaŭ malnovajn numerojn de *Amerika Esperantisto* al nia retarĥivo, por ke ĝi montru nian longan, seninterrompan, kaj foje eĉ tragedian historion. Mi esperas, ke mia decido ne ĝenos iun ajn. Kompreneble mi bonvenigas viajn reagojn, kiel ĉiam.



### HOSS FIROOZNA

Hoss redaktas la bultenon en sia hejmurbo de Roĉestro, Novjorkio. Liaj vortoj ne reprezentas la vidpunktojn de E-USA aŭ ties estraro; pri siaj opinioj kulpas nur li mem!

[hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org)

# ELNA kaj EANA: Fondo kaj malfondo

el la arĥivo • David B. RICHARDSON

---

Nian ĉi-numeran tempovojaĝon gvidas la fama David RICHARDSON, konata interalie kiel verkinto de la lernolibro *Esperanto • Learning and Using the International Language*. En ĉi tiu artikolo el № 1992:1 li klarigas la fortojn, kiuj kaŭzis skismon en la malnova Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA) kaj la sekvan fondon de ELNA.

---

**L**a organizita Esperanto-movado en Usono komenciĝis en 1905 kun la fondo, en Bostono, de Amerika Esperanto-Asocio. En 1908 AEA kuniĝis kun kelkaj aliaj “naciaj” grupoj en Usono kaj Kanado por formi unu solan Esperanto-Asocion de Norda Ameriko. Dum ĉirkaŭ 40 jaroj EANA funkciis kiel centra apoga organizaĵo, kies sola laŭstatuta celo estis antaŭenigi la studon kaj uzon de Esperanto.

En 1944 EANA bezonis novan redaktoron por sia oficiala organo *Amerika Esperantisto*. En la numero por Marto-Aprilo, tiama prezidanto d-ro Cecil Stockard anoncis la ekfunkcion en tiu posteno de George Alan Connor. Connor estis instruisto de manlaboraj metioj en la publikaj lernejoj de Novjorko, kiu bone konis la presan kaj publicistan artojn.

Kiel junulo, Connor iom vojaĝis tra la mondo, inkluzive viziton al Sovetunio, en tempo, kiam ties ankoraŭ juna “granda socia eksperimento” tiklis la intereson de multaj personoj en la okcidento. Liaj spertoj tie tiom negative impresis, tamen, ke lia politika vidpunkto koloriĝis per vivlonga kaj arda kontraŭkomunismo.

Estas interese, ke d-ro Stockard trovis dezirinde inkluzivi en sia anonco precizan deklaron, *subskribitan* de s-ro Connor, kun la titolo **NEK POR NEK KONTRAŬ IU AŬ IO KROM ESPERANTO**. “La celo kaj politiko de *Amerika Esperantisto*,” ĝi tekstis, “estos antaŭenigi Esperanton, kaj en do alia severa neŭtraleco estos observata.” En julio, d-ro Stockard (okulisto en Florido) vizitis ges-rojn Connor en Novjorko. Stockard poste raportis en AE, ke en konversacioj kun Connor “plej grava punkto estas, ke EANA kaj AE ekzistas nur por progresigi Esperanton kaj por plirapidigi ĝian oficialan agnoskon kiel monda interlingvo. Tiu ĉi punkto estas substrekinda.”

Pro la milito, EANA ne kongresis inter 1942 kaj 1946. En 1945 okazis perpoŝta balotado por novaj oficistoj. La kandidatojn (nur unu por ĉiu ofico) nomis la estrara komitato, “en neekzisto de kandidatiga komitato”. Per tiu balotado s-ro Connor fariĝis ankaŭ ĝenerala sekretario de EANA.

Li enposteniĝis kun granda energio. Dum mallonga tempo li organizis efikan oficejon en sia novjorka apartamento; varbis teamon de talentaj volontulaj helpantoj; redaktis, parte mem verkis, kaj eldonigis la gravan inform- kaj lerno-libron *Esperanto: the World Inter-language*; starigis subtenan fonduson por financi seriozan reklamadon de Esperanto; triobligis la nombron da membroj; kaj dume publikigis, pli aŭ malpli regule, plaĉaspektan kaj interesan revuon.

Necesas rimarki, ke la Esperanto-movado estis ĵus eliranta el terure stagna periodo: la ekonomia krizo de la tridekaj jaroj preskaŭ mortbatis ĝin finance, dum la leviĝo de naciismoj transmare, kaj de izolismo enlande, prezentis plej malfekundan teron por semi internaciisman idealon. Ke Esperanto travivis, ŝuldiĝis grandparte al la obstino de individuoj kun tre granda volforto, diversloke tra la lando, kiuj instruis kaj propagandis la lingvon, vendis librojn, prezentis radio-disaŭdigojn, ktp., ĉiu plimalpli laŭ sia propra iniciato.

Nun en 1947 s-ro Connor konsideris, ke por vere progresigi Esperanton, EANA devus ne nur ludi rolon apogan kaj koordinan en la movado, sed ke ĝi devus firme gvidi ĝin. Jam en la unua numero de AE por tiu jaro, li aludis al la neceso por “forta Centra Oficejo” — kun majuskloj—“kaj efikan organizaĵon”. En la sekvanta numero li pledis por “nedividita subteno kaj lojaleco al EANA”, por la unua fojo nomante ĝin la “unu oficiala” organizaĵo en Nordameriko, kaj plendante, ke “individuismaj ‘institutoj’, ‘Fondaĵoj’, ‘Libro-Servoj’ ktp. disipas niajn rimedojn kaj inklinitas al malharmonio.”

En la tria numero por tiu jaro li dediĉis apartan artikolon al plendo pri regiona Esperanto-grupo sur la Pacifika marbordo, kiu, kun sia propra bulteno kaj

libro-servo, “en realeco estas klopodo *dispartigi* nian Nordamerikan movadon”. Li asertis, ke la “oficiala movado ne povas rajtigi dividon de la teritorio de EANA”, kaj instigis “ĉiujn lojalajn kaj respondecajn esperantistojn ... subteni la Centran Oficejon, aĉeti siajn librojn tra la Centra Oficejo, sendi siajn novaĵojn al AE, kaj ignori privatajn entreprenojn kiuj volus profiti el la laboroj kaj sindonado de via oficiala organizaĵo—EANA.”

Tiel estiĝis la konflikto inter s-ro Connor kaj la “fortaj individuistoj” kiuj estis, ĝis signifa grado, la tradiciaj antaŭenigantoj de Esperanto en Nordameriko.

En la tuta 1948 ne aperis AE. Membroj ricevis “kompense” ekzempleron de *Esperanto: the World Interlanguage*. AE reaperis en 1949 kun ripetataj postuloj por “organiza disciplino” anstataŭ la “senrespondeca anarkio” de sendependaj entreprenoj. Ekde 1950, la enhav-paĝo portis regulan averton, ke EANA, kiel “laŭleĝa instanco” por Esperanto en Nordameriko, “ne respondecas” pri projektoj kaj eldonaĵoj, kiujn ĝi ne “rajtigis”.

Ankaŭ en 1950 AE por la unua fojo sugestiis, ke politika neŭtraleco, kiun devigis al EANA sia statute, ne estis absoluta. En artikolo kun la titolo “‘Interna Ideo’ kaj ‘Neŭtraleco’”, Prezidanto William Solzbacher diskutis kreskantajn kritikojn, ke EANA forlasadis ambaŭ. “Kiam Esperanto estas uzata por disvastigi evidentajn mensogojn aŭ por subfosi la demokratian konstitucion kaj la liberecon de nia lando,” li skribis, aludante ferkurtenajn landojn, kiuj eldonis en Esperanto kontraŭ-usonon propagandon, “nia ‘neŭtraleco’ tute ne devigas nin toleri tion senproteste”.

Dume, signifa nombro da membroj, malkontentaj pri tio, ke s-ro Connor—laŭ ili—volis “diktatori” ĉion kaj ĉiun en la Esperanto-movado, iniciatis kampanjon forigi lin el la posteno de Ĝenerala Sekretario en la venontjara balotado. Tiu iniciato fiaskis meze de plendegoj, ke ŝanĝoj en la balotada regularo certigis rezulton favoran al Connor kaj liaj kunuloj.

En AE por septembro-oktobro 1951, EANA nete kaj definitive reĵetis la neŭtralismon. En artikolo titolita “Ni Elektas Liberecon”, Connor asertis (sen kiuj ajn pruvoj), ke “Komunistoj ... penas enpenetri en la ‘neŭtralajn’ Esperanto-organizaĵojn por ... komunistigi

ilin per la jam konata metodo de ‘borado de interne’”. Avertante pri “trompisto inter ni” kiuj kaŭzas “malfacilaĵojn ... per ruza kaj ‘ruĝa’ agado”, li deklaris, ke EANA ne povas esti neŭtrala “inter la bono kaj la malbono, demokratieco kaj la absolutismo, libereco kaj sklavigo, Ameriko kaj la Soveta Unio”.

Pluraj tiaspecaj artikoloj (inkluzive aparte vitriolajn atakojn kontraŭ Teo Jung, la respektata eldonisto de *Heroldo de Esperanto*) aperis en AE ekde tiu tempo, plimalpli subtile ŝajnigante kunligon inter la supozata komploto komunistigi la Esperanto-movadon, kaj kreskanta grupo da membroj, kiuj insistis je forigo de Connor kaj reorganizo de EANA.

Ĉu inter tiu opozicio troviĝis eĉ unu vera komunisto estas duba, kaj Connor nenium akuzis rekte, sed skribis kaj parolis en ĉirkaŭfrazoj pri “la kamaradoj”, “komunistemaj konvinkoj”, kaj pri “persone ambiciaj kaj/aŭ ekstreme radikalaj individuoj” ktp.

Frue en 1952 Connor postulis en la paĝoj de AE, ke “membroj de EANA akordiĝu kun generate akceptitaj principoj de Nord-Ameriko (kiuj) ne inkluzivas komunistan sklavigon” kaj iom ĉifre rebatis ies plendon, ke “ni ne povas rifuzi membrecon al komunistoj”. La klarigo estas, ke en tiu jaro gvidantaj personoj en la opozicio trovis sin efike eksigitaj el EANA, kiam iliaj realigaj kotizoj estis tutsimple rifuzitaj kaj resenditaj.

Opozicianoj nun perdis ĉiun esperon reorganizi EANA-n de interne, kaj starigis grupon por ekplani novan asocion, kio kulminis en fondiĝo de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko antaŭ la fino de tiu jaro.

ELNA rapide establiĝis kun kreskanta membraro kaj regule aperanta revuo, kun respondeca malkresko en la membro-nombro kaj financoj de EANA. Kiam ELNA faris peton al UEA pri agnosko kiel oficiala landasocio por Norda Ameriko, paralele kun EANA, la Komitato de UEA pretiĝis konsideri ĝin dum la Universala Kongreso en Haarlem, Nederlando, en 1954. S-ro Connor estis ano de tiu Komitato. Membroj de EANA faris monkoklekton por certigi, ke li povu ĉeesti la kunsidojn.

La decido de la Komitato estis, ke EANA bonfide klopodu restarigi unuecon en la nordamerika movado ĝis la fino de la jaro; kaj en kazo de malsukceso, la

Komitato rekonsideru la peton de ELNA en Bologna, Italujo, en 1955.

Reveninte de la Kongreso, ges-roj Connor raportis en AE pri antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj, pri bela sunbrilo kaj gaja etoso, pri festparoladoj kaj la prezo de buterpano en Haarlem, sed neniun vorton pri la komitata decido. Neniuj klopodoj restarigi unuecon okazis, kaj ĉe la UK en Bologna en 1955 ELNA estis agnoskita kiel oficiala landasocio paralele kun EANA.

AE por julio-oktobro, 1955, respondis al tio per longa atako kontraŭ UEA kaj ties “nuna potenculo” (d-ro Ivo Lapenna), akuzante ilin pri “absolutismo”, “apogo de la maldekstra flanko de nia movado”, pri diversspecaj intrigoj, kontraŭstatutaj agadoj ktp. Eĉ pli venenaj akuzoj kontraŭ UEA kaj Lapenna aperadis en postaj numeroj. Kiel rezulto de tiaj atakoj, la Komitato voĉdonis eksigi s-ron Connor el UEA. Tiu rarega, preskaŭ senprecedenca ago estis apelaciita kaj konfirmita per granda plimulto da voĉoj ĉe la UK en Kopenhago en 1956.

La Komitato ankoraŭ diskutadis, ĉu forigi ankaŭ EANA-n el UEA, sed tiun demandon findecidis la estraro de EANA mem per memvola ekŝiĝo.

AE aperadis post tio kun eĉ pli da artikoloj remaĉantaj la temojn de komunismaj intrigoj en- kaj

ekster-lande, ĝis 1958, kiam la eldono fariĝis neregula, kaj 1959, kiam ĝi tute ne aperis. En tiu jaro grupo de esperantistoj el ambaŭ partioj formiĝis por studi eblecojn reunuigi la du organizaĵojn. La Kongreso de ELNA en St. Louis aprobis la klopodon, nur insistante pri “politika kaj religia neŭtraleco kaj interna demokrateco” en nove reunuigita asocio. AE (reaperanta neregule en 1960) nomis la klopodon “ruzaĵo de radikalaj ruzuloj” kaj deklaris, ke “unueco restas en tio”, ke “ne-radikalaj esperantistoj” aliĝu al EANA, kaj “la ribelaj elementoj (en ELNA) reiru al SAT kaj maldekstraj partioj sub la ruĝa standardo, de kie ili devenis”.

Post majo, 1961, okazis nova interrompo en la eldonado de AE. Kiam ĝi reaperis en septembro, 1963, ĝi havis novan adreson en Portlando (Oregonio), kien ges-roj Connor dume transloĝiĝis. La revuo eliris pli kaj pli neregule. La lasta numero aperis en 1967 post kiam EANA mem praktike ĉesis ekzisti. George Alan Connor mortis en 1973.

### **David B. RICHARDSON**

David estis membro kaj Subtenanto de EANA kaj dum multaj jaroj ludis gravan rolon en ankaŭ ELNA, interalie kiel ĝia Prezidanto dum pluraj jaroj.

# La ŝlosita ĉambro

enigmoj • Daĉjo RUTAN

**E**lija ŜIBOLET sidis en la salono de sia amiko, Arĉjo

KOLOFON, la fama, blinda, violonisto. Trinkajaĵoj sidis sur malgranda tablo inter la du viroj. Arĉjo zorge prenis la sian kaj trinketis.



“Mi kredas, ke li fraŭdis min je dekmil dolaroj, sed mi ne scias, kiel li faris la aferon.”

“Eble se vi klarigu”, diris Ŝibolet.

“Pasintsemajne Rikardo RUZEFAR vizitis. Li estas la filo de mia forpasinta violon-instruisto. Rikardo ĉiam trinkas zingibran sodakvon kaj ni babiladis pri kelkaj misteroj de la speco ‘ŝlosita ĉambro’ ĝis mi vetis kun li je dekmil dolaroj.”

“Rikardo iris tien al la verŝotablo, metis ses glacikubojn en glason kaj donis ĝin al mi. Li tiam prenis botelon de zingibra sodakvo kaj eliris el la ĉambro.”

“Mi ŝlosis la pordon kaj la fenestrojn, kaj palpis por certigi, ke lia glaso enhavis nur glacikubojn. Mi metis

la glason en la gardoŝrankon en la muro malantaŭ vi, kaj ŝlosis ĝin. Tiam mi pretigis mian vekhorloĝon, malŝaltis la lampon kaj sidis, atendente.”

“La veto estis, ke ene de la paso de unu horo Rikardo povos eniri la malluman, ŝlositan ĉambrom, malfermi la gardoŝrankon, preni la glason, elpreni la glacion, verŝi duonglason da zingibra sodakvo, reŝlosi la gardoŝrankon kaj eliri el la ĉambro. Ĉion sen fari eĉ brueton!”

“Mi aŭdis nenion dum la tuta tempo. Post unu horo, kiam mia vek-horloĝo sonis, mi malŝlosis la pordon. Mi ordonis, ke Rikardo fajfadu ekster la pordo dum mi iris kaj malfermis la gardoŝrankon. La glaso ankoraŭ estis en ĝi. Je la barbo! Ĝi estis duonplena kun zingibra sodakvo. Mi gustumis ĝin! Sed kiel li faris la aferon?”

Ŝibolet finis sian trinkaĵon. “Sendube per izolita sako”, li diris post mallonga penso. “Estas nenio misa pri viaj oreloj, ĉar neniuj povus aŭdi ...”

---

... aŭdi *kion*? Se vi scias, bonvolu sendi nur unu solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Decembro**. Inter la solvintoj ni lotumos \$5-rabaton de la retbutiko.

---

## Senintencaj esperantaĵoj?

### Benu



Chris trovis la jenan ŝildon en Canton, Georgio. Ne nur Esperanta teksto, sed eĉ verda!

— Chris McDowell


### Ami



Larry trovis la jenan ŝildon en Nov-Zelando, kie ĝi reklamas ne amon, sed asekuran firmaon *Allied Mutual Insurance*.

— Larry Bennett

### Vero



Jen alia foto el Nov-Zelando. Denove temas pri asekura firmao. Ĉu koincido, aŭ ĉu Esperanto helpas novzelandanojn senti sin pli sekuraj?

— Larry Bennett

### Forto



La nova laktokafo de Hershey's estas tiel forta, ke oni nomis ĝin *forto*. Efektive, etikedo sur la taso avertas: “FORTO™ ne estas por infanoj, nek por virinoj kiuj mamnutras infanojn aŭ estas gravedaj.”

— Mara Rockliff



# La timanta riĉulo

enigmo-solvoj

En nia pasintnumera enigmo, *La timanta riĉulo*, profesoro Elija ŜIBOLET vizitis apartamenton de sia amiko, Petro.



Petro konsentis atesti antaŭ kortumo pri bankorabo, kiun li vidis, kaj pro tio li timis, ke oni volas murdi lin. Li estis tiel nervoza, ke li sukcesis dormi nur tage. Do kvankam Ŝibolet vizitis lin frumatene, por Petro estis preskaŭ horo por enlitiĝi.

Samtempe kun Ŝibolet alvenis nova servistino, kiu kunportis al Petro manĝon dum li kaj Ŝibolet konversaciis. Ŝibolet tuj suspektis ion misan: “Ne trinku tion!” li kriis, kiam Petro levis glason de vino al siaj lipoj. Kio alarmis Ŝiboleton, kaj kial?

La plej frua solvo venis de ... nu, ĉu vi povas diveni? Kompreneble, ĝi venis de nia nelacigebla detektivo Rafa NOGUERAS:

Ŝiboleto sciis, ke la manĝo estis venenita, ĉar temis pri vespermanĝo, ne matenmanĝo ...

Aha. Jes, la servistino portis ne nur vinon, sed ankaŭ sandviĉon kaj ĉokoladan kukon – ne aparte konvenan manĝon por matena horo. Nia inspektoro Ellen EDDY klarigis pli:

Kiam la nova servistino – kiu neniam antaŭe renkontis Petron – pretigis por li vespermanĝajn manĝetojn, ŝi versaĵne sciis pri la nova rutino.

Ĝuste. Efektive ŝi ne estis servisto, sed spiono kiu jam observis Petron. Kiel nia detektivo Erik FELKER skribis:

[en la manĝaĵo ŝi] povus kaŝi la saporon de veneno aŭ de dormiga medikamento, kiu ebligis la forkapton de Petro. Mi esperas ke li povos trovi pli fidindan serviston.

Gratulon al ĉiuj pro la bonaj solvoj. **En la lotumado ĉi-foje gajnis Rafa kaj Ellen.** Ili ricevos po \$5-rabaton de la retbutiko.

---

## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Se vi sendas materialojn poŝte, ni resendos ilin al vi se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

*Usona Esperantisto* estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, your address, and a head shot. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. If you send materials by mail, we will return them to you if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike license BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we additionally ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.